## Sceno 1

*En la komputilejo.*

**Korvaks:** Ĉu ĝi ankoraŭ funkcias?
Ho! Jes, ĝi funkcias.



**Komputilo:** Bonan vesperon!

**Korvaks:** Kiom da princinoj ekzistas?

**Komputilo:** Ses.

**Korvaks:** Ne! Ili estas sep!

## Sceno 2

*Karlo kaj Mazi en la dometo de la palaca ĝardeno.*

**Karlo:** Ĉu ankoraŭ pluvas?
**Mazi:** Ne, nun estas bela vetero.
**Karlo:** Jam malheliĝas.
**Mazi:** Kioma horo?
**Karlo:** Estas preskaŭ la sepa.
Kaj jam malheliĝas!
En aŭtuno, malheliĝas je la sepa.
**Mazi:** En aŭtuno?



***-iĝ** = to become (get, grow, turn, come to be)*
hela *(= bright)*, heli**ĝ**i *(= to brighten)*
plena *(= full)*, pleni**ĝ**i *(= to grow full)*

***Je kioma...?***
Kioma horo estas? —Estas la sesa.
Je kioma horo malheliĝas? —Je la 7-a (horo).





## Sceno 3

*Sezonoj kaj monatoj*



**Petro:** En aŭtuno malheliĝas je la sepa.
En vintro malheliĝas je la kvina.
En printempo malheliĝas je la sepa.
En somero malheliĝas je la naŭa.



**hela, malhela**
**heliĝas, malheliĝas**

**Voĉo:** Septembro, Oktobro, Novembro,
Decembro, Januaro, Februaro,
Marto, Aprilo, Majo,
Junio, Julio, Aŭgusto



**Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro.**

## Sceno 4

*Nomoj de la semajnotagoj*

**lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato, dimanĉo**

## Sceno 5

**Ĵurnalisto:** Kiam vi ludas futbalon?
**Petro:** Lunde.
**Ĵurnalisto:** Kiam vi ludas korbopilkon?
**Edzino:** Marde.
**Ĵurnalisto:** Kiam vi rulsketas?
**Petro:** Merkrede.



**Ĵurnalisto:** Kaj kiam vi gimnastikas?
**Edzino:** Ĵaŭde.
**Ĵurnalisto:** Kiam vi kutimas naĝi?
**Petro:** Vendrede.
**Ĵurnalisto:** Kiam vi ludas golfon?
**Edzino:** Sabate.
**Ĵurnalisto:** Kiam vi ludas tenison?
**Petro:** Dimanĉe. Dimanĉo estas hodiaŭ.
**Edzino:** Hodiaŭ ni ludas tenison.

> **Tempaj adverboj: -e**
> Kiam? —Lund**e** (je lundo)

## Sceno 6

*Karlo kaj Mazi en la dometo de la palaca ĝardeno.*




**Mazi:** Kie estas la ĉambro de Silvja?
**Karlo:** Tie!
**Mazi:** Kie? En la unua etaĝo?
**Karlo:** Ne! En la dua.
**Mazi:** En la dua etaĝo estas tri ĉambroj.
Kiu estas ŝia? Ĉu tiu maldekstra?
**Karlo:** Tiu ne!
**Mazi:** Ĉu tiu dekstra?
**Karlo:** Ankaŭ ne tiu.
**Mazi:** Ĉu tiu meza?
**Karlo:** Jes, tiu estas ŝia ĉambro. Ŝia ĉambro estas tiu meza.
**Mazi:** Kies estas tiu ĉambro? Tiu en la supra etaĝo?
**Karlo:** Tiu estas la ĉambro de Korvaks, la komputilejo.

> **De Silvja = *Silvja's***
> Tiu ĉambro estas de Silvja.

> **Kies? = *Whose?***
> **Kies** estas tiu ĉambro?
> —Tiu ĉambro estas de Korvaks.





## Sceno 7

*Pli da Pseŭdo-Silvjaj kopioj aperas en la komputila ĉambro.*



**Korvaks:** Ĉesu! Ĉesu! Ne! Ne! Ne!

## Sceno 8

*En la dormoĉambro de Silvja.*

**Silvja:** Ĉio... estas... en ordo!
Mi havas manĝaĵon. Mi havas horloĝojn.
Jam estas preskaŭ la sepa. Bone!
Mi malfermu la pordon... mallaŭte,
Ĉirkaŭrigardu... atente!
Kuru malsupren... rapide!

*Silvja renkontas Pseŭdo-Silvja-aron.*

**Pseŭdo-Silvja:** Saluton, Silvja!
**Silvja:** Saluton! ...Alia mi? Ho, estas la sepa.
Karlo atendas min! Ho! Mi... ree mi!
**Reĝino:** Estas la sepa horo! Vespermanĝo, Silvja!
**Pseŭdo-Silvja1:** Jes, panjo!
**Pseŭdo-Silvja2:** Jes, panjo!
**Pseŭdo-Silvja3:** Jes, panjo!
**Pseŭdo-Silvja4:** Jes, panjo!
**Pseŭdo-Silvja5:** Jes, panjo!
**Pseŭdo-Silvjaj...:** Jes, panjo! Jes, panjo. Jes, panjo. Jes, panjo!
**Reĝino:** Rigardu! Ĉiu estas Silvja!
**Reĝo:** Kiom da ili estas?

> **Kiel? — -e**
> Atent**e**, rapid**e**, mallaŭt**e**, bon**e**